

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 21/03/2019 Kvarcentdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur kun la dekaj eldonoj



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)
[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo all courses](#) [lingvohelpilo](#)
[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#).

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **809,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **337,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **310,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **162,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G."


N.ro 60 (La Plena Analiza Gramatiko de Waringhien kaj Kalocsay)



Krom esprimati en finitivo, infinitivo, kaj substantivo, la ago povas esprimati ankaŭ en Adverbo kaj en Adjektivo, kutime en Participoj. Se la ago estas en Adverbo, ĝia Subjekto estas sama al la Subjekto de la Verbo en la Predikato, ekz. "Foririnte al Usono ni nun malofte vidas lin" = ni vidas do ni foriris. Se la ago estas en Adjektivo, ĝia aganto estas la Subjekto de la predikata verbo: "La gazetisto, favora al Esperanto, konsentis nian peton" = la gazetisto konsentis do la gazetisto favoris.

Aliaj mencioj en P.A.G. pri la Subjekto de la ago en neverboj estas memkompreneblaj.

Marcel Leereveld



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



La Manlia Esperanto-Klubo


Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. La 14a de marto estis la tria sabato.

Venis Roger Springer, Michael Peters, Chris Holliss kaj John Casey.

Roger Springer



Post nia jarkunveno, la membrojn de "BES" ĝojigis kafo kaj kuko apud la Brizbana Biblioteko. Vidu foton de maldekstra: Ness & Erhard, gastino Naomi, Petro (sekretario/ kasisto), Sandra, Oscar (retmajstro), Paul, Johano, Caroline (vicprezidantino) ; forestis prezidanto Doug Eising



Sendis Peter Danzer



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Ĉu Esperanto plibonigis la mondon?

Antaŭ tagoj aperis mia nova libro kun la titolo: "**Ĉu Esperanto plibonigis la mondon?**"

Ĝi libere kaj senpage legeblas en la retpaĝo: <http://verkoj.com/verkistoj/markus-gabor/>

Gabor Markus



ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO



Ĝardenistoj lernas el la praktiko.



KIAL NE "FIŜMANGĜI" ?

Se oni volas fari novan vorton per la kunmetado de du ekzistantaj radikoj, oni kompreneble devas obei kelkajn regulojn. Principe la kunmetaĵo rezultas el transformado de Prepozitivo, de Substantivo antaŭita de prepozicio, ekz. "de la urbo" kaj "por la tablo". Tia prepozitivo neniam uziĝas memstare, sed uziĝas kun (antaŭa) vorto, kiun ĝi determinas, difinas, t.e. al kies signifo ĝi aldonas ekstran signifon. Ekz. "la domo (de la urbo)" kaj "la tuko (por la tablo)". Tia Prepozitivo havas similan funkcion kiel adjektivo: ĝi komplementas la Substantivon (aŭ alian vortkategorion). Kiel "la GRANDA domo" kaj "la domo DE LA URBO", aŭ "la PURA tuko" kaj "la tuko POR LA TABLO". T. e. ke ĉe la kunmetado, "la urbodomo" kaj "la tablotuko", la novaj kunmetitaj vortoj (vortkunmetaĵo) fariĝas unu vorto kun unu (nova) signifo.

De tempo al tempo mi mencias, ke en Esperanto, ja aglutina lingvo, oni ne rajtas fari i.a. la jenajn kunmetaĵojn:

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

1). Substantivo kun sia adjektivo (kiu ja ne estas prepozitivo!); do NE “la ruĝrozo” nek “la blankdomo” nek “la purtuko”.

2) Verbo kun sia adverbo (kiu ja ne estas prepozitivo!); do NE “rapidflugi” aŭ “tujveni” aŭ “laŭtdiri”.

3). Verbo kun sia Gramatika Objekto (kiu ja ne povas esti Prepozitivo); do NE “fiŝmanĝi” por “manĝi fiŝojn” nek “viandvendi” por “vendi viandon”.

(Notu ke oni rajtas uzi tiajn kunmetaĵojn SE oni ŝanĝas la substantivon (rozo, tuko) aŭ la verbon al alia vortkategorio: ruĝroza kaj purtuke, kaj rapidfluge kaj tujvena, kaj fiŝmanĝulo kaj viandvendo, aŭ uzas sufikson).

Oni povas demandi la kialon (= peti la tialon) de tia malpermeso. Nu, ĝi ĉeestas pro la fakto, ke en la nova, kunmetita, vorto mankas la signifo “speciala”. Nek ruĝrozo nek blankdomo nek purtuko nek rapidflugi nek tujveni nek laŭtdiri nek fiŝmanĝi nek viandvendi estas specialaj specoj de rozo, de domo, de tuko, de flugi, de veni, de diri, de manĝi kaj de vendi. Sen tiu regulo pri specialeco oni povus kunmeti ĉiun substantivon kun ĉiu adjektivo kaj kunmeti ĉiun verbon kun ĉiu adverbo aŭ objekto, kio kaŭzus kompletan ĥaoson kaj malfacilcon. Tial ankaŭ la neaglutinaj lingvoj esprimas la diferencon inter la du specoj, inter la speciala kaj la okaza specoj: “*Les fromages de Hollande*” kaj “*Les fromages de la Hollande*”. Do se vi kreas novan vorton per vortkunmetado, zorgu ke ĉeestas la nocio “speciala”. Eĉ P.A.G. , kiam ĝi pritraktas la kunmetadon, forgesis mencii tiun regulon, kvankam en alia parto de la libro ĝi mencias la specialecon en la kunmetaĵoj.

Marcel Leereveld.

ĈU ESTI HONESTAJ KAJ SAMTEMPE LERNEMAJ ?

Ni ĵus elektis novan A.E.A.-estraron, kaj mi demandas al la membroj “Ĉu en A.E.A.-aferoj la estraranoj devas esti honestaj? Kaj mi demandas ankaŭ: “Ĉu la Estraranoj devas, kune kun la membroj, lerni el la historio? Lerni el la grandaj eraroj faritaj en la historio de nia organizo. Mi ŝatus esti certa pri tio. Kaj mi komparas nin al politika partio, kiu kuraĝe kaj honeste konfesas siajn estintajn erarojn kaj volas lerni el ili. Se la politika partio daŭrigas kaŝi siajn erarojn kaj ne deziras publike lerni el siaj eraroj, mi ne voĉdonas por ili. Se ili honeste diskutas siajn erarojn, mi tendencas voĉdoni por ili, aŭ almenaŭ mi pli respektas ilin.

La aŭstraliaj politikaj partioj montris en sia historio signojn de diktaturemo, aŭ almenaŭ ĉe la gvidantoj, kaj kelkfoje tio kreis politikajn malbonaĵojn, malbonajn por la tuta lando aŭ por granda aŭ malgranda parto de nia lando. Kelkaj politikaj partioj penas kaŝi tion, kaj esperas ke ni forgesos. Ĉu eblas ke A.E.A. faras aŭ faris, kaj do eble faros, la samon? Ĉu en nia verkota historio ni agos same malhoneste?

Ne diru ke ni forgesu pri la eraroj kaj koncentriĝu nur pri la estonteco, ĉar ni tiel tre facile refaros aŭ permesos refarati similajn “plorindajn” batalojn. En pasintaj bataloj en A.E.A. neniu antaŭe atendis tion, kio okazis, kaj tamen ili okazis. Kaj mi povas certigi al vi, ke antaŭ la dua mondmilito neniu atendis ke la nazianoj murdos milon da judoj. Oni ne povis imagi

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

tion. Same ni ne povas imagi la realan eblon ke bataloj revenos al A.E.A., Ni do lernu eviti ilin.

Marcel Leereveld.

LA ESPERANTISTA KONFUZO PRI LA PARTICIPOJ.

Ĉar la etnaj lingvospecialistoj ne scias ke iliaj lingvoj havas tri malsamajn participojn, ankaŭ la Esperantologoj ne scias tion, kaj konsekvence faras erarojn en Esperanto.

Post pluraj antaŭaj klarigoj, jen kroma:

LA PASIVA VOĈO TENAS EN SI ĈIUJN ELEMENTOJN DE LA AKTIVA VOĈO, KVANKAM EN MALSAMA VICORDO. PRO TIO ANKAŬ LA GRAMATIKA TEMPO (ANGLE: *TENSE*) ESTAS EN LA PASIVA VOĈO LA SAMA KIEL EN SIA AKTIVA VOĈO, KVANKAM PASIVVERBA. Jen do la konsekvenco, en Esperanto, en la angla, kaj en la franca: (la samo validas por plej multaj aliaj eŭropaj lingvoj)

Prezenco: AKTIVA

PASIVA

Ili a p l a ŭ d a s la kantiston. >>>>>> La kantisto a p l a ŭ d a t a s de ili.

(malmoderne: e s t a s a p l a ŭ d a t a).

Preterito: AKTIVA

PASIVA

Ili a p l a ŭ d i s la kantiston. >>>>>> La kantisto a p l a ŭ d a t i s de ili.

(malmoderne: e s t i s a p l a ŭ d a t a).

Futuro: AKTIVA

PASIVA

Ili a p l a ŭ d o s la kantiston. >>>>>> La kantisto a p l a ŭ d a t o s de ili.

(malmoderne: e s t o s a p l a ŭ d a t a).

Imperfekto: AKTIVA

PASIVA

Ili e s t a s a p l a ŭ d a n t a j la kantiston. >>>> La kantisto e s t a s a p l a ŭ d a t a.

Ili e s t i s a p l a ŭ d a n t a j la kantiston. >>>> La kantisto e s t i s a p l a ŭ d a t a.

Ili e s t o s a p l a ŭ d a n t a j la kantiston. >>>> La kantisto e s t o s a p l a ŭ d a t a.

Perfekto: AKTIVA

PASIVA

Ili e s t a s a p l a ŭ d i n t a j la kantiston. >>>>> La kantisto e s t a s a p l a ŭ d i t a.

Ili e s t i s a p l a ŭ d i n t a j la kantiston. >>>>> La kantisto e s t i s a p l a ŭ d i t a.

(nomiĝas Pluskvamperfekto en la eŭropaj lingvoj)

Ili e s t o s a p l a ŭ d i n t a j la kantiston. >>>>> La kantisto e s t o s a p l a ŭ d i t a.

Predikto. AKTIVA

PASIVA

Ili e s t a s a p l a ŭ d o n t a j la kantiston. >>>>>> La kantisto e s t a s a p l a ŭ d o t a.

(ne ekzistas en la franca, angla, aŭ germana)

Ili e s t i s a p l a ŭ d o n t a j la kantiston. >>>>>> La kantisto e s t i s a p l a ŭ d o t a.

(ne ekzistas en la germana, aŭ angla, aŭ franca)

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Ili e s t o s a p l a ŭ d o n t a j la kantiston. >>>> La kantisto e s t o s a p l a ŭ d o t a.

(ne ekzistas en la angla aŭ franca aŭ germana)

La participoj en Esperanto kun “esti” NE estas kaj ne nomiĝas verboj, sed adjektivoj.

La franca, angla, kaj germana lingvoj uzas helpverbojn por ĉiuj agtempoj de la pasiva voĉo, kaj por ĉiuj agtempoj de la aktiva voĉo escepte de la Prezenco kaj la Preterito kaj, por la franca nur, la Futuro. Esperanto NE uzas, aŭ ne bezonas uzi, helpverbojn en la Prezenco, la Preterito, kaj la Futuro de KAJ la aktiva KAJ la pasiva KAJ la mediala KAJ la faktitiva voĉoj, kaj do estas la plej logika kaj la sole senescepta lingvo. La Imperfekto, la Perfekto, kaj la Predikto ne estas en Esperanto verbaj gramatikaj tempoj, kaj iliaj adjektivaj Participoj do bezonas helpverbon (esti k.t.p.) por fariĝi Predikativoj.

Sed nun la problemo de la eŭroplingvaj Esperantistoj (de ĉiuj gradoj, ĝis la plej kleraj). Iam en la vivo ili lernis traduki perfektotempan eŭroplingvaĵon al Perfektotempa Esperantaĵo. Kaj malĝuste, ĉar ili ne sciis ankoraŭ ke en sia eŭropa lingvo ekzistas Pasiva Participo, sen tempsignifo, kiel en “*The letter was signed half an hour ago*”. La nura pasinttempa verbo estas “*was*”, ĉar ne temas en ĉi tiu frazo pri du pasintaj tempoj, pri pluskvamperfekto. Ĉar nur unu vorto, “*was*”, povas indiki la pasintan tempon, la verbo “*signed*” ne povas indiki la (duan) pasintan tempon; fakte ĝi indikas nur la agon kune kun sia pasiva voĉo. La koresponda aktiva voĉo ja ankaŭ havas nur unu pasintan tempindikilon, “*They signed the letter half an hour ago*”, Oni subskribis la leteron antaŭ duona horo. La traduko de la pasiva frazo do devas nepre esti “La letero estIS subskribATA antaŭ duona horo”.



Marcel Leereveld.



La tuta mondo estas mia patrujo



Jen io pripensinda!

Mi loĝas en Avenuo Duffield, do iuj homoj erare opinias, ke Avenuo Duffield estas mia patrujo. Do, se mi bezonas ion, kio ne haveblas en Avenuo Duffield, mi devos ja portempe elmigri al alia strato, ekz. Kamerun’ Vojo, ĉu ne? Tie estas butikumejo. Mi ja bezonas butikumejon por – kontraŭ mono – akiri la necesaĵojn de la vivo!

Fininte mian butikumadon en Kamerun’-Vojo mi ja deziras transporti miajn varojn, sufiĉe multekostajn, hejmen al Avenuo Duffield, ĉar tie mi ja loĝas!

Nu, se oni estus akceptintaj la volon de tiuj “iuj” homoj, necesus do por mi viziti konsulejon, kaj ne estas konsulejo en Avenuo Duffield. Kion povas do fari saĝulo? Ne multon, aŭ ĉu?

Por eniri Kamerun’ Vojon necesus havi vizon kaj pasporton. Kaj por akiri vizon kaj pasporton necesus ja viziti konsulejon kaj malŝpari sian tutan tagon en ties atendejo, ĉu ne? Sed ankaŭ Kamerun’ Vojo ja ne havas konsulejon. Do, se iu loĝanto de Kamerun’ Vojo vidus min en sia strato, ĝi estas ja lia strato, ĉar li naskiĝis en ĝi, ĉu ne? Li tuj alvokus la policon, kiu venus kaj arestus min. La televido sendus ĵurnalistojn, kiuj venus kaj intervjuus min. En la vespero ili

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

montrus min televide sur la ekranoj en ĉiuj stratoj kaj mondopartoj. La plej multaj homoj freneze kriegas: "Mortigu lin, li estas tro danĝera, li venas el Avenuo *Duffield*! La registaro devus fari ion por ke ne plu io tia povu okazi!

Ĝuste tia estas la mondo hodiaŭa, pli aŭ malpli freneza, pardonu, sendube pli frenezega, ĉu ne? Ni vidas la pruvon de tio ĉiutage. La mondon regas ne ekzakte eksterordinare pacamantaj kaj regkapablaj homoj.

Laŭ tiaj homoj, onia patrujo estas la lando, en kiu oni naskiĝis. Laŭ mia opinio, ĉar mi estas multe pli homama, la patrujo estas la planedo, sur kiu oni naskiĝis. Bonvolu pripensi tion, kiam vi venontan fojon iros elekti novan kaj multe pli bonan registaron!

Bob Felby

La devigitaj fondusoj por la pensioj

Antaŭ la fino de ĉi tiu jaro, la devigitaj fondusoj por la pensioj (*super*) valoros ĉirkaŭ \$ 3 miliardojn da dolaroj. Tio estas stulta kvanto da mono.

Por meti tiun ciferon en perspektivon, niaj ŝparoj por niaj emeritaj periodoj valoras tiom multe kiom valoras *Google, Apple, Amazon* kaj *Microsoft* kune.

Ĝi estas grandega sumo... Kaj ne estas miro ke iu ŝatus kontroli la potencon de ĝi por si mem. Tiu mono estas la mono de la Aŭstralia popolo. Zorgu!!!

Roger Springer



AMOS OZ KAJ ESPERANTO

Je Decembro la 28a mortis Amos Oz, israela verkisto (kies eldonoj tradukiĝis el la hebrea en 40 lingvojn), profesoro de literaturo ĉe la universitato Ben-Gurion, kaj multe pli. Jam de longe mi lin admiris, ne malplej pro tio, ke li estis fervora advokato por du-ŝtata solvo de la israela-palestina krizo.

Mi ĵus legis anglan tradukon de lia novelaro, *Inter Geamikoj (Between Friends)*. Temas pri aro da netaŭguloj (eble la angla '*misfits*' pli taŭgas) en kibuco. Laŭ Oz, "*en la kibuco ni ĉiuj devus esti geamikoj - sed ne estas vere*". Li parolas de persona sperto, ĉar li mem loĝis en unu, sen sia familio, plurajn jarojn ekde sia 15a jaro

Oz estas ege honesta kaj la protagonistoj, kvankam kunloĝantoj, fakte vivas tre solece pro tio, ke ili tiom malsimilas unu la alian. La infanoj kapablas agi kaj ja agas, kruele. Tamen, Oz komprenas la komplikaĵojn de la homa kondiĉo kaj akompanas lian honestecon granda simpatio.

La titolo de la lasta novelo en la aro estas *Esperanto*, en kiu Martin Vandenberg, travivinto de koncentrejo, mortanta pro pulmomalsano, volas instrui la lingvon kiu estas "*nova, facila, celanta unuiĝi la tutan homaron*". Mi lasos vin legi la sukceson de lia strebo.

Laŭ mi, ĉi tiu novelaro meritas tradukon en la lingvon amata de Martin V.

VERA PAYNE



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



RAPORTO PRI LA LABORO KAJ FINANCOJ

La jarraporto pri 2018 estas preta

Ni informas vin, ke la jarraporto pri la agado de edukado.net en la jaro 2018 estas preta kaj legebla. Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=785>

La publika raporto sen la detalaj financaj partoj elŝuteblas en la [dosierujo](#).



3zzz

Je la momento vizitas Melburnon esperantistino, Françoise Desrondaux, el vilaĝo, apud Tuluzo en la sudo de Francujo. Ŝi ĉeestis la ĉiudimanĉan renkonton en Federation placo kaj la radiostudion 3ZZZ de kie ni elsendas ĉiun lundon. Se ankaŭ vi volas renkonti ŝin, aŭskultu la elsendon de la 18a de marto **Franciska Toubale**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE